

EKO 2013

Rekreita arĥivo de la ok postkongresaj komunikoj de la jaro, lanĉita sub la nomo 'Estraraj Komunikoj' kun la celoj subteni la landan agadon kaj la novan AMO-programon.

EKO 2013-06 sendita el Budapeŝto la 21an de novembro

Al: Estraro de ILEI, Landaj Sekcioj de ILEI, komitatanoj de ILEI kaj e-ins

Jam iris al Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA. Poste iros al RK, Komitato, Konsilio, TEJO, grupoj.

Karaj!

Ni ĝojas enmanigi al vi tre koncizan superrigardon de la enhavo de la nova Strategia Plano de nia Asocio, kiun la Komitato akceptis en Rejkjaviko. Dum tiu UK, ni konstatis la bezonon prezenti pli simplajn resumojn de tiu plano – la plena 42-paĝa dokumento vere celas kernajn aktivulojn kaj dezirantojn de detalo. Ni plue laboros por krei alilongajn resumojn kun invitoj al la membroj praktike partopreni en la laboroj.

La nuna superrigardo estis kreita de nia nova redaktoro de la revuo *Esperanto*, Fabricio Valle kune kun lia grafikista/teknikista kolego, Paŭlo Lima. Ĝi donas antaŭguston pri tio, kio atendeblas en la revuo mem.

Ni liveras ĝin en formato PDF, sed laŭpete ni povos liveri ĝin ankaŭ en formo de lumbilda prezentaĵo (PPT) kun pezo de aŭ 1.3 MB (aŭ 9 MB se vi preferas!).



La dokumentoj fariĝos alireblaj en la retpaĝaro de UEA. Ni invitas vin diskonigi la nunan dokumenton al viaj membroj, eble pere de via propra retejo, kaj uzi ĝin en la grava tasko revarbi membrojn por la Asocio, kaj plie por altiri novajn. Intensiĝo de agado ĉe UEA en la kampoj de Konsiigo, Kapabligo (tio estas NI!) kaj cetero dependas je la financaj enspezoj de pli granda membrobazo ol ni nun havas. Do, la aktiva kunlaboro de niaj Landaj kaj Fakaj Asocioj, kaj lasueble ankau de ILEI esencas por nia komuna prospero. Varbado estas unuavice la tasko de la Landa Asocio, la Komitato(j) kaj la kotizperanto. Sed via helpo ege bonvenas; materialon ni disponigos tiucele.

Nur per pli granda membronombro, UEA havos la bezonatajn rimedojn por dediĉi al la instrua agado. Antaŭdankon pro viaj grandaj klopodoj tra la sekvaj monatoj!

Aldono: La 680 kilobajta versio de la PDF.

Iris: Nov 21, 2013



Nova servo de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, lanĉita en julio 2013, kaj seninterrompe liverita depost tiam, per 264 komunikoj.

